

# Kiel Hungario revalorigas dubindan naciisman literaturon kaj evitas certajn aŭtorojn de la nuntempo

**En Hungario la instruplano devas esti adaptata laŭ la gusto de la Fidesz-partio de ĉefministro Viktor Orbán, la demokratie elektita aŭtokrato de tiu danuba landeto, kiu laŭ la volo de la regantoj konsideras sin “malliberala demokratio”. En la nova hungara literatura kanono aperas libroj de naciismaj aŭtoroj el la 19/20a jarcento, kies verkoj havas antisemitisman karakteron.**

Kiam fine de januaro 2020 en Budapeŝto estis prezentita la nova instruplano pri literaturo, enfokusiĝis la historia pasinteco. Estis akcentitaj principoj kiel la fortiĝo de la kristana familio, la identiĝo kun la hungara nacio, la defendo de la patrujo. En la serio de la devige leginda literaturo en Hungario aperas aŭtoroj, kiuj estas apostoloj de la (dekstra) hungara naciismo kaj proksimaj de la faŝismo kaj antisemitismo: Inter ili okulfrapas precipe *Ferenc Herczeg (1863-1954)*, *József Nyírő (1889-1953)* kaj *Albert Wass (1908-1998)*, kiuj estas simboloj kaj herooj de la literatura kanono de la dekstrema hungara populismo. Sed pri kiaj aŭtoroj efektive temas? Kiajn sekvojn tiuj literaturaj prioritatoj havas por la publika debato en Hungario, estos analizata en la sekva artikolo.

## Herczeg, Nyírő kaj Wass – hungaraj naciistoj kaj malamikoj de la judoj

**Ferenc Herczeg** naskiĝis la 22an de septembro 1863 kiel Franz Herzog en riĉa „ŝvaba“ familio el Banato, Aŭstrio-Hungario. Lia patro estis urbestro de Vârșec (Serbio). Herczeg unue lernis en hungara mezlernejo de la piaristoj en Szeged kaj Temesvár (nun Timișoara en Rumanio) kaj en la publika mezlernejo en Fehértemplom (germane: Weißkirchen, nun Bela Crkva en Serbio). Li studis juron en Budapeŝto, kie li ankaŭ trovis sian profesion, kun li praktikis kiel advokato. Poste li komencis literaturan karieron, verkante siajn unuajn tekstojn en la germana, poste en la hungara. Laŭ tiu vojo la germano Herczeg fariĝis hungaro, tiel ke lia hungariĝo estas konsiderata kiel modela ekzemplo, kun ĉiuj fatalaj konsekvencoj.

En siaj tiam ege popularaj historiaj romanoj Herczeg kutimis priskribi sortoplenajn turnopunktojn en la hungara historio. Ekzemple en la romano „La sep ŝvaboj“, kiu baziĝis sur malnova germana rakonto, la aŭtoro pentris aŭtentikan bildon pri la streĉata rilato inter la hungara loĝantaro kaj aliaj naciecoj, kaj levis jenan demandon: „Kiu estas hungaro?“ por doni la respondon: „Tiu, kiu konsideras sin tia!“ Alia romano traktis la reziston de la islamaj peĉenegoj kontraŭ la deviga bapto. Iu amrakonto temis pri la sangaj bataloj inter hungaroj kaj turkoj en la 16a jarcento. Kaj alia libro rakontis pri iu papelekto, en kiu iu hungara kardinalo estis preskaŭ elektita kiel nova ĉefo de la eklezio. La kulminon de sia populareco Herczeg atingis en 1917 post la apero de la „Blua vulpo“.<sup>1</sup> Dufoje, en 1926 kaj 1927, li eĉ estis proponita kiel nobel-premiito pri literaturo. Herczeg admiris la hungaran malsupran nobelaron kaj montris kompletan malintereson pri la senprivilegiaj tavoloj. Li scipovis teknike lerte sed enhave supraĵe amuzi kaj distri la burĝan hungaran mezan klason, kies sociaj radikoj ankoraŭ troviĝis en la antaŭmilita tempo. Sed Herczeg evitis tuŝi gravajn individuajn aŭ naciajn konfliktojn. Ajnan ŝanĝon de la sociaj, literaturaj aŭ teatraj kondiĉoj li rifuzis, ĉar li estis konservemulo. Politike, en 1896 Herczeg fariĝis parlamenta deputito, en 1903 orda membro de la Akademio de la Sciencoj kaj en 1904 prezidanto de la Petőfi-societo. Kiel unu el la plej popularaj verkistoj de Hungario li ligiĝis al la Horthy-epoko, en kiu li estis dume subpremata nur de la registaro de la soveta respubliko de Béla Kun en 1919, kiu tamen daŭris nur mallonge. Kiam la 21an de junio 1926 estis fondita la „Hungara Revizia Ligo“, Herczeg revenis al la hungara parlamento kiel „konfidanto de Horthy“. Kiel prezidanto de la Revizia Ligo Herczeg laŭte postulis la revizion de la pactraktato de Trianon, dank’ al kiu Hungario perdis pli ol du trionojn de sia iama teritorio kaj pli ol tri milionojn da etnaj hungaroj. Tiu postulo estis tiel bone akceptita de la hungara publiko, ke oni forgesis kritiki la fuŝan ekonomian kaj socian politikon de la registaro. La hungara propagando kreis

---

<sup>1</sup> En 1938 aperis germana filmo kun Zarah Leander sur la bazo de la rakonto de Herczeg (vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/The\\_Blue\\_Fox\\_\(1938\\_film\)](https://en.wikipedia.org/wiki/The_Blue_Fox_(1938_film)); <https://www.youtube.com/watch?v=xCaJfg0Nc5Y>.)

gigantan bruon ĉirkaŭ tiu reviziismo, tiel ke la hungara popolo, kiu priploris la perdon de la iama imperia statuso de sia lando, komencis kredi je la baldaŭa renaskiĝo de Hungario.

Ĝis 1944 Herczeg estis ĉefa reprezentanto kaj parolisto de la konservativismo, kiu celis malaboli la ekzistantan ordon. En tio li ankaŭ ŝatis polemikon kun ĵurnalistoj, per kiu li enmiksiĝis en la politikon en la nomo de la hungara patriotismo. Kvankam Herczeg persone ŝatis la filon de la eksa kompostisto de iu revuo, kiun li eldonis, kiu siaflanke nomis la eldoniston „(plej) ŝatata aŭtoro de Horthy“,<sup>2</sup> li montris simpatian por la itala faŝismo, sed klare rifuzis la germanan nacisocialismon. Malgraŭ tio, li ne estis imuna kontraŭ la furiozanta antisemitismo de tiu tempo. La alfluo de judoj al Budapeŝto estis malvolonte vidata, ĉar oni konsideris la judismon nekongrua kun la hungaraj tradicioj; tial Herczeg nomis la judajn civitanojn „fremdaj elementoj en la kemio de Budapeŝto“. Kiam en 1942 la edzino de lia estimata kompostisto petis lin en granda timo, ke li savu ŝian edzon kaj protektu lin de la deportado al iu hungara koncentrejo, kio signifis la certan morton por judoj, Herczeg rigardis ŝin kun miro, dirante: „Sinjorino, sed via edzo estas judo!“

Post la dua mondmilito Herczeg alfrontis la venĝon de la komunistoj, kiuj ekskludis lin de la politika kaj socia vivo kiel nedezirata persono, ĉar la deziroj de lia Revizia Ligo ne kongruis kun la politiko de Moskvo. En 1949 li estis forstrekita de la membrolisto de la Hungara Verkista Asocio kaj ankaŭ perdis sian membrecon en la Akademio de la Sciencoj. Laŭdire, Herczeg malaperis en iu lagro de la hungara gulago, de kiu li estis liberigita post la morto de Stalin, sed pri tio ne ekzistas pruvo. Herczeg forpasis la 24an de februaro 1954 en Budapeŝto. Nur en la 1980aj jaroj li estis denove malkovrita de la teatro kaj iuj eldonejoj kaj estis plene rehabilitita kiel persono kaj verkisto en la postkomunisma tempo.<sup>3</sup>

\* \* \*

**József Nyírő**, naskita la 18-an de julio 1889 en Székelyszombor (Jimbor, distrikto Braşov, Rumanio, tiama Aŭstrio-Hungario), estis etna hungara verkisto, pastro kaj politikisto, apartenanta al la minoritato de la sekeloj<sup>4</sup> de Transilvanio. Nyírő vizitis katolikan mezlernejon kaj ricevis plian trejnadon en katolikaj alt-lernejoj en Alba Iulia kaj Vieno. De 1919 li laboris kiel katolika pastro en la rumana distrikto Cluj. Forlasinte la preĝejan oficon pro ekskomuniko el la katolika eklezio, ĉar li edziĝis kun la amatino de la junaĝo, li laboris kiel muelisto, poste kiel ĵurnalista. Sekve, li fariĝis parolisto de la hungara sekcio de la Eŭropa Verkista Ligo, fondita de Joseph Goebbels, kaj aliĝis al la hungara parlamento kiel membro de la ekstremdekstra, antisemitisma Transilvania Partio. En parolado de 1942 li nomis la judojn „miksantoj de veneno“, kiuj „detruas la hungaran animon kaj infektas nian spiriton“, kaj deklaris, ke „la koncepto de la dekadeca liberala juda tradicio, tiu vualita propagando, devas malaperi de la hungara vivo.“ En oktobro 1944 la Partio de la sagokruculoj puĉe akaparis per germana helpo la povon en la parto de Hungario, kiu ankoraŭ ne estis okupata de la sovetia armeo. En la sekvo estis lanĉita senekzempla murdorgio kontraŭ la hungariaj judoj, de kiuj pereis kelkaj dek mil dum la Szálasi-reĝimo.<sup>5</sup> Dum ĉi tiu periodo Nyírő restis ligita kun la „parlamento“ de la sagokruculoj, sed kiam la Ruĝa Armeo alproksimiĝis al Budapeŝto, en marto 1945 li fuĝis al Germanio. En 1947, László Rajk, la hungara ministro pri internaj aferoj, petis la aliancanojn transdoni lin al Hungario, ĉar la komunistoj konsideris lin militkrimulo laŭ la Londona Statuto de 1945, sed la peto malsukcesis. En 1948 Nyírő fariĝis prezidanto de la nove fondita Hungara Kultura Asocio en Munkeno. Post la fondiĝo de la Germana Federacia Respubliko (FRG) Nyírő foriris al Hispanio por eviti akuzon aŭ elpelon pro la ŝanĝita jura situacio. Nyírő forpasis la 16-an de oktobro 1953 en Madrido, la ĉefurbo de la frankisma Hispanio, kie multaj faŝistoj kaj nazioj trovis ŝirmon. Post 2010 la hungara registaro de Viktor Orbán deklaris lin grava nacia poeto de la hungara popolo kaj faris liajn verkojn deviga legaĵo en la lernejoj de Hungario. En majo 2012 okazis akra disputo inter la registaroj de Hungario kaj Rumanio, post kiam la hungara registaro anoncis la solenan translokadon de la cindro de Nyírő al la rumana urbo Odorheiu Secuiesc por neoficiala reentombigo. Tiu afero evoluis al suka skandalo. Laŭ la rumana registaro, la honorigo de Nyírős, kiu faris antisemitismajn, por-faŝimajn kaj kontraŭrumanajn eldirojn, kontraŭdiras eŭropajn valorojn. Anstataŭ reentombigo okazis malgranda ekumena di-

<sup>2</sup> Kiu estis Horthy, vd. sub [https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós\\_Horthy](https://eo.wikipedia.org/wiki/Miklós_Horthy).

<sup>3</sup> Laŭ [https://de.wikipedia.org/wiki/Ferenc\\_Herczeg](https://de.wikipedia.org/wiki/Ferenc_Herczeg).

<sup>4</sup> Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Sikuloj>.

<sup>5</sup> Pri la sagokruculoj kaj Szálasi vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Arrow\\_Cross\\_Party](https://en.wikipedia.org/wiki/Arrow_Cross_Party) kaj [https://en.wikipedia.org/wiki/Ferenc\\_Szálasi](https://en.wikipedia.org/wiki/Ferenc_Szálasi).

servo por la verkisto, kiun ĉeestis la gvidanto de la partio Jobbik, la hungara ŝtata sekretario pri kulturo, Géza Szócs, kaj la ĉefo de la hungara parlamento, László Kövér. Ĉi-lastaj plendis, ke la rumana registaro estas „senciviliza“, „paranoja“, „histeria“ kaj „barbara“, kaj anoncis, ke oni enterigos la restaĵojn de Nyírő en unu aŭ alia maniero, ĉar lia cindro estas jam kontrabandita al Rumanio. Registraraj aŭtoritatuloj traserĉis la veturilojn por eviti, ke la urno estos entombigita en la antaŭvidita loko, sed la urno kun la cindro de Nyírő ne estis trovita kaj malaperis sub neklaraj cirkonstancoj. Elie Wiesel, Nobel-premiito kaj postvivanto de la holokaŭsto, skribis en letero al László Kövér, ke li estas kolera, ke Kövér partoprenis la ceremonion honore al verkisto, kiu estis lojala membro de ekstremdekstra hungara parlamento dum la dua mondmilito, kaj ke li konsideras la akton indigna por estro de hungara parlamento, ĉar per tio li honorigis la hungaran faŝisman ideologion kaj glorigis la malhelan pasintecon de la lando. En alia protesto Wiesel redonis la Grandan Krucon, kiu estas hungara registara premio, kiun li ricevis en 2004. En sia responda letero al Wiesel Kövér atentigis, ke la usonaj, britaj kaj sovetiaj generaloj de la Aliancita Kontrol-Komisiono de 1945 kaj 1947, kiam ili dufoje rifuzis transdoni la ekzilitan verkiston malgraŭ peto de la tiama hungara komunisma ministro pri internaj aferoj, klarigis, ke Nyírő ne estas milit-krimulo, nek faŝisto aŭ antisemito. Li ankaŭ menciis, ke la rumana registaro de Nicolae Ceaușescu traktis Nyírő-n kiel bone rekonatan verkiston kaj certigis pension por lia vidvino en la 1970-aj jaroj. Krom tio, Kövér citis hungaran judan sciencan re-cenzon, en kiu la koncerna ĵurnalo deklaris, ke naziaj idealoj aŭ antisemitismaj esprimoj ne povas esti trovitaj en la literaturaj verkoj de Nyírő. Laŭ Kövér, Nyírő do meritas respekton ne pro liaj – kvankam bagatelaj, sed certe tragike misformitaj – politikaj agadoj, sed pro liaj literaturaj verkoj. Ĉio tio sonas kvazaŭ kiel oni faris pakton kun la diablo.<sup>6</sup>

\* \* \*

La tria reprezentanto de tiu ´skolo´ de hungaraj verkistoj estas grafo **Albert Wass** de Szentegyed kaj Czege, kiu naskiĝis la 8an de januaro 1908 en Válaszút (nun Răscruți, distrikto Cluj, Rumanio, tiama Aŭstrio-Hungario). Li estis hungara nobelo, arbara inĝeniero, roman-verkisto kaj poeto. La eklezian lernejon li trapasis en Cluj, la diplomon pri arbarkuracado de la Akademio pri Ekonomiko li akiris en Debrecen. Siajn studojn pri arbara kultivado li daŭrigis en Germanio kaj en la pariza universitato Sorbonne, Francio, kie li ricevis pliajn diplomojn. En 1932 li reiris al Transsilvanio kaj devis ĉeesti la devigan militservon en la rumana armeo, poste li administris la familian bienon en Transsilvanio.

De majo 1942 li partoprenis armean trejnadon de la hungara kavalerio kiel rezerva oficiro. En 1944 li fuĝis el Transsilvanio al Hungario kaj poste aliĝis al la forkurantaj Wehrmacht-fortoj kaj atingis Germanion. Sed en 1951 li elmigris al Usono kun kvar filoj, kie li ricevis la usonan civitanecon kaj vivis ĝis la morto. Intertempe, rumana popola tribunalo akuzis lin kaj lian patron kiel militkrimulojn kaj esprimis la mort-punon, ĉar dum la dua mondmilito ili ordonis la mortigon de rumanaj kamparanoj, inter kiuj troviĝis du judaj virinoj. Albert Wass ankaŭ estis akuzita pro tio, ke li instigis la mortigon de 11 judoj fare de hungaraj soldatoj. Tamen la usonaj aŭtoritatoj rifuzis resendi lin al Rumanio (en 1979), ĉar al ili mankis pruvoj, ke tiuj krimoj vere okazis. Tiu versio estis konfirmita eĉ post kiam la Wiesenthal-Centro plendis kontraŭ la decido, ĉar Wass estis tamen akuzita pro la mortigo de judoj. Post reanalizado de la kazo Usono restis sur la sama pozicio kaj neis la akuzojn kontraŭ li, des pli ke Wass daŭre insistis pri la versio, ke li havas nenion komunan kun la mortigo de judoj, kaj asertis, ke li estas viktimo de „rumana cionisma“ konspiro. Krom tio, Albert Wass plurfoje atentigis, ke la sekreta polico de komunisma Rumanio, la Sekuritato, klopodis mortigi lin, sed li ne povis pruvi tiun aserton. En 2008, lia filo Andreas Wass apelaciis al la rumanaj tribunaloj, ke oni nuligu la verdikton, sed la rumanaj tribunaloj opiniis, ke la situacio de la akuzo ne ŝanĝiĝis kaj tial konfirmis la kondamnon.

La unuaj libroj de Wass estis eldonitaj en 1927 kaj 1929 en Cluj, Rumanio. En 1934 aperis lia romano „Lupa foso“ en la Transsilvania Gildo de la Artoj. La verkoj de Wass unue rikoltis rekonon nur ene de la hungara literaturo de Transsilvanio en la 1940-aj jaroj. En Usono Wass fondis la Usonian Hungaran Gildon de la Artoj, administrante ĝiajn akademian laboron kaj eldonajn agadojn, kaj redaktante ĝian informilon. Krome, li lanĉis sian propran eldonejon „Danubian Press“, kiu eldonis ne nur librojn, sed ankaŭ anglalingvajn revuojn de la Gildo. Liaj eldonaĵoj fariĝis gravaj kontraŭ-bolŝevismaj forumoj de la hungaraj ekziluloj. Dum la komunisma tempo liaj libroj estis malpermesataj kaj en Hunga-rio kaj en Ru-

<sup>6</sup> La historio ripetiĝas, kiam simila argumentado estis aplikata okaze de la havigo de la nobelpremio pri literaturo al la aŭstra verkisto Peter Handke en 2019, kiu dum la jugoslaviaj militoj de la 199aj jaroj staris flanke de Serbio kaj de serbaj naciistoj, kiuj murdis milojn da kroatoj, bosnianoj kaj albanoj.

manio, pro kio en tiu periodo li estis nekonata al la tiamaj generacioj. Parto de liaj verkoj es-tis publikigitaj en Hungario nur post la ŝanĝo de la politika sistemo en 1989. Ĝuste en tiu jaro li retiriĝis de la politika aktiveco de la elmigrintoj kaj ĉesis eldoni siajn publicaĵojn kaj librojn. Malgraŭ tio kaj la kontestata karaktero de liaj personeco kaj verkaro, en Hungario komenciĝis procezo de lia rehabilitado kaj heroigo ĉefe en naciismaj kaj maldekstraj cirkloj. La 20an de aŭgusto 1993 la hungara prezidanto Árpád Göncz premiis lin per la Hungara Merita Ordena Kruco laŭ la propono de ĉefministro József Antall, kiun li ricevis en la venonta jaro de la hungara konsulo en Florido.

Dum jaroj la hungara gazetaro subtenis la kredon, ke malgraŭ liaj ripetaj petoj, Albert Wass ne reakiris la hungaran civitanecon antaŭ sia morto, ĉar lia peto estis plurfoje malakceptita de la hungara ŝtato, kiu asertis, ke li estas rumana civitano. Wass mortigis sin la 17an de februaro 1998 en la aĝo de 90 jaroj en sia Florida loĝejo post longa lukto kun la sano post aŭtomobila akcidento, kiun li travivis du jarojn antaŭe, kaj verŝajne ankaŭ pro malfavoraj familiaj kaj financaj cirkonstancoj. Lia fina deziro estis deponi liajn restaĵojn en la ĝardeno de la vilao Kemény en Brâncovenesti, distrikto Mureș, Rumanio. En 2007 la flanko de la tiama hungara prezidento László Sólyom klarigis, ke Wass reakiris la hungaran civitanecon en 1997, do unu jaron antaŭ lia morto, sed li ŝajne rifuzis akcepti ĝin, ĉar li sentis sin ofendita

En 2005 Wass estis deklarita kiel unu el la plej popularaj hungaraj aŭtoroj. Precipe inter ekstrem-dekstruloj popularas ĉefe lia antisemitisma verkaĵo „La akaparo de la tero fare de la ratoj. Instruaĵo por junaj hungaroj“. En somero 2010 la nova hungara prezidento Pál Schmitt menciis en sia unua parolado la verkiston Albert Wass lige kun la renaskiĝo de la hungara nacio.<sup>7</sup> Malgraŭ lia kontraŭdira statuso, pri Wass ekzistas pluraj statuoj en Hungario kaj Rumanio, kun aŭ sen nomo. La reprezentantoj de la reganta partio Fidesz kaj la radikala naciisma partio Jobbik kune voĉdonis komence de 2011, ke pluraj publikaj placoj estu nomitaj laŭ li en Budapeŝto.<sup>8</sup>

Okulfrape estas, ke tiuj pasintaj hungaraj verkistoj originis el regionoj, kiuj iam apartenis al Aŭstrio-Hungario sed troviĝis ekster la kerna hungara lando, precipe Banato kaj Transsilvanio. Laŭ la spirito de ilia tempo, ili ĉiuj iel servis al la ideoj de la naciismo, faŝismo kaj anti-semitismo. Dum Herczeg restis en Hungario, fine de la dua mondmilito du el ili fuĝis kaj elmigris al eksterlando, ĉar ili timis gravajn akuzojn kaj punojn en siaj patrujoj, kaj perdis la praktikan ligon kun la malnovaj hejmlandoj, regataj de komunistoj. Malgraŭ tiuj gravaj makuloj en iliaj biografioj, la regantaj hungaraj politikistoj de la post-komunisma Hungario rehonorigis tiujn verkistojn, ĉar per ili eblas renovigi kaj flegi la ideologion de la hungaraj naciismo kaj patriotismo.

Estas do la tasko kaj respondeco de la instruistoj de Hungario kiel plej taŭge prezenti tiujn verkistojn al la lernantoj kaj interpretu iliajn skribaĵojn.

## **Hungaraj instruistoj tamen protestas**

Dum la pasintaj tridek jaroj en la instruista trejnado de Hungario rimarkinde maturiĝis kaj disvastiĝis dekstraj radikalaj mondperceptoj. Ĝiaj subtenantoj nun festas la novajn registarajn gvidliniojn. Sufiĉe sentebla estas la protesto en instruistaj medioj, en kies sociaj retoj oni afiŝas fotojn, kiuj montras, ke multaj instruistoj tamen ne pretas instrui faŝisman literaturon. Asocioj de verkistoj kaj postenuloj de katedroj por hungara literaturo, konataj lernejoj kaj edukistoj, instruistaj asocioj, lernantoj kaj gepatroj organizas publikajn protestojn. Kiel en ĉiuj aliaj aktualaj disputoj, multaj homoj timas, ke la hungara kulturo povus perdi sian reputacion kaj ke la ŝtata potenco ne pretas dialogi kun kritikantoj, nek korekti sian sintenon. Tamen estas okulfrape, ke multaj konservativuloj, konsciencaj kristanoj kaj maltrankviligataj patriotoj pli kaj pli distanciĝas de la ŝtataj atakoj kontraŭ la kulturo.

Ekzemple, diversaj akademiuloj rezistis, kiam lastatempe gravaj esplorinstitutoj estis retiritaj el la Hungara Scienca Akademio. Ili evidentigis publike, ke la avido al absoluta registara potenco kaj la lezo de diversaj civilaj rajtoj ne estas konservativa nek kristaneca aŭ patriotisma. Tiamaniere la registaro perdas pli kaj pli da simpatiantoj inter homoj, kiujn ĝi iam kredis posedi por longa tempo.

<sup>7</sup> Vd. <https://www.facebook.com/notes/solveigh-calderin/die-Ära-des-revisionismus-iii/10153839019873702>.

<sup>8</sup> Laŭ [https://en.wikipedia.org/wiki/Albert\\_Wass](https://en.wikipedia.org/wiki/Albert_Wass), konsultitaj estis ankaŭ la germana kaj hungara versioj.

## Famaj aŭtoroj de la nuntempo estas evitataj

Aldoniĝas jena cirkonstanco. En la disputo pri la deviga literaturo estas videble, ke gravaj modernaj aŭtoroj kiel Imre Kertész kaj Péter Esterházy, mankas en la kanono, kvankam temas pri du hungaraj verkistoj, kiuj akiris mondan famon kaj esence kontribuis al la bona reputacio de la hungara literaturo. Sed ial ili ŝajnas esti dorno en la okuloj de la Orbán-reĝimo. Ke oni ignoras aŭ evitas la aŭtoron Esterházy (1950-2016), ano de fama hungara nobela familio, kiu estis subpremata dum la komunisma tempo, ne estas miriga, ĉar li kritikegis la Orbán-reĝimon per sia plena literatura kaj intelekta aŭtoritateco. Aliflanke, la prisilentado de Kertész (1929-2016) estas tamen miriga, ĉar la hungara ŝtato investas multe da mono por disponi pri lia verkaro. Ĉu Kertész estas traktata tiel, ĉar li estis judo? Sed Orbán ja mem ĉeestis la entombigon de Kertész, kiu estis la sola hungara nobelpremiito pri literaturo. Eĉ se oni evitas tiujn du verkistojn, kaj Kertész kaj Esterházy estas akceptitaj almenaŭ kiel fakultativaj aŭtoroj. La tekstoj, kiujn oni devas legi, tamen datas de antaŭ 1989!<sup>9</sup>

Sed ne nur Esterházy kaj Kertész estas problemkazo por la aktuala hungara kulturpolitiko. Ankaŭ aŭtoroj kiel Péter Nádas, László Krasznahorkai, György Konrád, László Földényi, Lajos Parti Nagy, Pál Závada kaj multaj aliaj estas suspektindaj por la Orbán-partio, ĉar iliaj verkoj estis tradukitaj kaj eldonitaj en eksterlando, precipe en Germanio, kiun la nuntempa hungara ĉefministro ne konsideras unuagrada amiko, ĉar ĝi estas la plej forta EU-motoro kaj firme kontraŭbatalas la naciismajn faŝismajn kaj antisemitismajn tendencojn.<sup>10</sup>

Estus interese scii, kion opinias kaj diras la hungaraj esperantistoj pri ĉiuj tiuj aferoj.

A. Künzli, aprilo 2020

---

<sup>9</sup> Vd. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Peter\\_Esterházy](https://eo.wikipedia.org/wiki/Peter_Esterházy) kaj [https://eo.wikipedia.org/wiki/Imre\\_Kertész](https://eo.wikipedia.org/wiki/Imre_Kertész)

<sup>10</sup> Laŭ <https://www.derbund.ch/kultur/buecher/ungarns-schueler-muessen-jetzt-faschistische-literatur-lesen/story/18538906>.